1. April 1931

M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12

2209 b

7-a JARO, N-o 339 LEIPZIG, 2. / 4. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

La mizeregaj kondiĉoj de l' virino en Hindio

Depost kelkaj jaroj forta movado distingiĝas inter la kulturitaj virinoj de Hindio kun celo plibonigi la vivkondiĉojn de l' hindia virino. La organizintinoj de l' movado konstatis baldaŭ, ke la problemo pri politika k socia emancipado de l' hinda virino estas intime ligita kun tiu de ŝia edukado. Kiel ĉe la demando pri la liberigo de l' tuta hinda popolo, la unuaj venkendaj malhelpoj estas en tio la tradicioj, kutimoj plene kontraŭaj al la bezonoj de l' moderna vivo.

Du el tiuj kutimoj estas speciale anakronismaj k bedaŭrindaj: tio estas la enŝloso de l' junulinoj aŭ "Purda" k la infanedzecoj.

La "Purda"

Pro tiu ĉi kutimo multnombraj junulinoj hinduanaj k mahometanaj enŝlosiĝas ekde la aĝo de l' seksmaturiĝo. Ili ne plu vidas iun viron, krom sia patro k siaj fratoj. Ili restas vualitaj aŭ fermitaj en veturiloj k ĉirkaŭitaj de drapiraĵoj. Tiu ioma libero estas eĉ rifuzata al ili, kiam oni aplikas rigore la kondiĉojn de l' Purda.

La Purda aŭ enŝloso al junulinoj estas mahometana institucio aplikata kun plifortigita rigoro en norda Hindio, kie ĝi ofte estas adoptita de la hinduanoj. Malpli disvastigita ĝi estas en suda Hindio kiel en la gubernioj de Bombe k Madraso. Rezulte en tiuj lastaj regionoj la malriĉaj mahometanoj aplikas ĝin laŭ malpli rigora maniero. Bedaŭrinde, ekzistas ankoraŭ nuntempe en iuj komunumoj la tendenco adopti la Purda kiel signon de supera socia stato k de prospero. La *katiavar*-oj, ekzemple, adoptis ĝin nur depost kvindek jaroj. De tiam oni konstatis ĉe iliaj virinoj kreskadon de l' nombro da tuberkulozo-kazoj k akuŝ-mortoj.

La grado de enŝloso rezultanta de la Purda varias multe laŭ la regionoj. Ĝi estas la plej malalta ĉe la malriĉaj klasoj, kies virinoj povas cirkuli sur la publika strato k iri al sia laborejo kun la vualita kapo. La riĉaj virinoj povas uzi fermitajn veturilojn k limigitaj sociaj rilatoj estas permesataj al ili. Sed eĉ en tiuj kondiĉoj la Purda estas atenco al la natura digno de l' virino. De l' pure fizika vidpunkto ĝi esprimiĝas per bedaŭrinda manko de aero k korpekzercoj, kio sekvigas la fizikan difektiĝon de la raso.



Hinduana vilaĝo

La Purda povas esti tiel rigida, ke virino el la popolo povas esti enfermata en malgranda domo praktike senfenestra aŭ kun malfermaĵoj lokitaj en la supro de l' muroj. Kaj ŝi ne povas eĉ forlasi la domon por preni akvon por la mastrumaj bezonoj. Kvankam la familio estas malriĉa, ŝi neniel povas partopreni en la laboro, escepte kuireja, kiun ŝi povas prizorgi interne.

La kuracistoj, kiuj flegas la virinojn submetitajn al la Purda, renkontis sennombrajn kazojn de tuberkulozo k de hepatmalsanoj samtempe ĉe tiuj virinoj mem k ĉe iliaj infanoj.

La infan-edzecoj

La infan-edzecoj estas ankaŭ malnova kutimo praktikata same de l' hinduanoj k de la mahometanoj. Oni taksas, ke proksimume la duono de l' knabinoj en Hindio estas edzinigitaj antaŭ la fino de sia dekkvina jaro. La statistiko de 1921 malkovris, ke pli ol du milionoj da knabinoj estis edzinigitaj antaŭ la aĝo de dek jaroj. Ekzistis inter ili 100 mil vidvinoj.

Tio permesas kompreni la tutan gravon de l' leĝo Sarda, antaŭ nelonge voĉdonita, kiu fiksas je 14 jaroj por la virino k je 18 jaroj por la viro la aĝon necesan por povi kontrakti edziĝon. Se tiu leĝo estas serioze aplikata, ĝi havos kiel efikon doni grandan impulson al la edukado de l' junulinoj.

La utilo de l' lernejoj dependas grandparte de la valoro, kiun la gepatraj rimedoj aljuĝas al la instruado de siaj infanoj. Nu, tiel longe kiel la destino de l' hindaj junulinoj estos la edziniĝo en infanaĝo k la enŝlosiĝo per la Purda, ne ekzistos en Hindio publika opinio por postuli, ke la knabinoj havu la eblon ricevi bonan edukadon.

Plorinda situacio, precipe se oni konsideras, ke tiuj knabinoj estos en la sekvanta generacio la virinoj k patrinoj, kiuj difinos la nivelon de ekzistado k de hejma kulturo.

Ĉe la kapnombrado en 1921 en Brita Hindio, malpli ol unu virino el kvindek sciis legi k skribi. En neniu provinco vizitis unu knabino el kvin

Paul Gottschalk, Berlin 12

la lernejon; en iuj provincoj ne unu el 20 aŭ 25.

La nombroj montrantaj la aĝon, en kiu la knabinoj forlasas la lernejon, estas ankoraŭ pli signifaj. Ekzistas kvaroble pli da knaboj aŭ da knabinoj en la elementaj lernejoj, dek-okoble pli en la mezlernejoj k tridek-kvaroble pli en la superaj lernejoj.

Konsekvence estas malfacile trotaksi la valoron de l' plibonigo, kiun alportus ĉiu ŝanĝo en la kondiĉo de l' hinda virino. Nuntempe la nombro da hindinoj spertaj en la instru-profesioj k medicinaj zorgoj estas tragedie malgrandega. Kaj la baroj al la pligrandigo de ilia nombro estas grandaj. Kaj ĉie la amasa edukado de l' knabinoj k vilaĝaj infanetoj ne povas okazi sen granda kvanto da kvalifikitaj instruistinoj. Ankaŭ la sumo da suferoj neutile kaŭzataj al la virinoj pro manko de zorgoj medicinaj k de flegistinoj estas timiga.

Oni povas diri, ke la virinmovado en Hindio tenas la ŝlosilon por la progreso de tiu lando. Kiam la hindoj sukcesos liberigi sin de siaj fatalaj tradicioj, ili tute nature procedos al sia politika emancipiĝo.

Kompil-tradukis Noa.

BANKO BANKROTAS EN USONO

Bankistoj, juĝistoj, policistoj — ĉiuj kanajloj

La Banko de Usono bankrotis. Ĝi ne estis nacia banko, sed la fremdlandanoj ne sciis tion. Sekve ili deponis en ĝiaj 61 branĉoj 202 milionojn da dolaroj. Usonanoj ankaŭ deponis monon, kvankam ne trompitaj per la nomo. Sume, 400 mil da ili estas prirabitaj. Oni certigis al ili, ke ĝi baldaŭ ree malfermiĝos. Tiom da mono ne povas esti perdata. Dume, aliaj bankoj pruntedonas al la deponintoj ĝis 50% kontraŭ 5%-a rentumo.

Jam pasis kelkaj monatoj ŝed la banko restas fermita. La esploro pri ĝiaj aferoj malkovris strangajn manovrojn. La ŝtata bank-komisiono iom kontrolas la investojn de bankoj. Por eviti tion oni formis pli ol 50 subkorporaciojn. Multaj el ili havis la nomojn de Parizaj stratoj. La akciojn posedas la bank-oficistoj. Ili pruntedonis la monon al si mem k poste spekulaciis sen ia kontrolo. Estis pruntoj sen garantio al politikistoj, banditoj, kontrabandistoj, juĝistoj. Ĉe la ĉiumonataj kunvenoj la bandaĉo el gvidintoj donacis al la konsilantaranoj (kontrolkomitatanoj) po 50 dolaroj (or-moneroj). Ili siavice aprobis la pruntojn senĝene. Kiam evidentiĝis, ke la banko troviĝas en malbona situacio, oni organizis agitadon por akiri plurajn deponantojn, k sukcesis kapti preskaŭ 60 mil viktimojn. Antaŭ la fermo la prezidanto Markos (Marcus) donacis al sia edzino 2,5 milionojn da dolaroj.

La sama s-ro Markos posedas pecon da tero ĉe la urblimo apudmara. Li pagis imposton por ĝi laŭ la valoro de 90 mil dol. La edukkomisiono decidis konstrui kolegion sur ĝi. S-ro Markos postulas unu milionon.

La diversajn intrigojn manipulis la sagaca advokato k membro de l' konsilantaro (de la banko) Kresl (Kresel). Antaŭ kelka tempo la publika procesanto komisiis lin enketi ĉe la malsuperaj juĝejoj (magistrates courts: La juĝistoj tieaj estas elektataj de la urb-estro.) Tre vigle li fosis en la fiodora putraĵo k malkovris kloakon plenan de diabla vomaĵo. En ĉiu kapitalista lando la publikulinoj dividas siajn enspezojn kun la polico. La Nov-Jorkaj leĝ-gardantoj, la fako nomata "kontraŭ malvirta taĉmento", eltrovis pli bonan negocon. Ilia dungato eniras hejmon per ia preteksto — por forvendi ŝtrumpojn, ĉemizojn ktp. Li metas kelkajn dolarojn sur la tablon. Eniras detektivoj k policistoj k arestas la fraŭlinon aŭ virinon kiel publikulinon. La dungato-fispiono (stool pidgeon) malaperas. La juĝisto ĉiam akceptas la deklaron de la arestinto. La arestito aŭ subaĉetas aŭ estas enkarcerigata. Unue ŝi devas pagi al parazito por ke li garantiu la kaŭcion. Ŝi ne scias, ke la "kontraŭ malvirta taĉmento" informis lin. Li siavice rekomendas al ŝi advokaton. Ĉi tiu rekomendas subaĉeton. Por minimume 500 dolaroj li aranĝas ĉion. Multaj virinoj, kiuj rifuzis subaĉeti, ankoraŭ restas en "reformejoj".

Tio estas nur parto de la malnobla komercaĉo, kiun malkovris Kresl. La urba konsilantaro provis malhelpi lin per ĉiuj rimedoj. Ekzemple, ili rifuzis pagi la salajrojn de liaj helpintoj. Kiam la Banko de Usono bankrotis, oni kaptis la okazon por senkreditigi Kresl k sukcesis tiel, ke li rezignis. Ne ĝenas la politikistojn, ke dume ili malebligis la malfermon de la banko.

S-ro Siberi (Seabury), kiu daŭrigas la enketon, ricevis oferton de iu minac-postulistino, Vivian Gordon, atesti kontraŭ ŝiaj kolegoj. La sekvintan tagon oni trovis ŝian kadavron en parko. Kelkajn tagojn poste ŝia 16-jara filino sin mortigis. La polico permesis al kelkaj suspektitoj rifuĝi. Do Siberi estis devigata dungi **neoficialajn** detektivojn. Ĝis nun, nur du policistoj estis punataj per maldungo, kvankam la fispiono Ĉili Akuna atestis kontraŭ almenaŭ 75, policistoj, detektivoj, serĝentoj, kapitanoj.

Iam mi legis en "S-ulo": "Cara Rusio estis la klasika lando de korupto k subaĉeto". Estas en ordo rimarki, ke la K-do, kiu skribis tion, neniam estis en Usono.

Ben Odinov (13 268).

Se vi volas legi bonan prolettendencan literaturon en esperanto, abonu al

LA NOVA EPOKO

monata organo de SAT!

Unuopa kajero 0,35 mk. g.

Kiel la nuna ekonomia malviglo efikas sur la instruistan vivon en Japanio

(Fino. Vidu antaŭan n-on.)

La ekonomiaj malfaciloj ĝeneralaj estas la ĉefa kaŭzo por malpliiĝo de varbitoj al privataj lernejoj, kien filoj k filinoj de etburĝoj iras; sed alia grava kaŭzo ne mankas. Tio estas senutileco de la edukado ĉe liceoj por gefiloj de etburĝoj, kies ekonomia vivo ne multe superas tiun de proletoj, k la plejmulto el la gefiloj devas tuj post elfino de l' lernejo sinsubteni. Por tiuj, kiuj eniras kolegion, la nuna japana liceo (speciale la registara) tre taŭgas: ĝi estas kvazaŭ prepara lernejo al kolegio. Tamen por tiuj, kiuj ne povas eniri pli altan lernejon, ĝi ne multe utilas. Sed antaŭe mankis al ili taŭga lernejo k ili vole nevole eniris liceon, ĉar sen tio ili estos malpli kvalifikitaj. Sed nun estas multaj teknikaj lernejoj, k estas multaj branĉoj de industrio, kie teknike kvalifikitaj knaboj k knabinoj estas dungataj. Kaj pro tio multaj etburĝoj, komencis sendi siajn gefilojn al teknik-lernejoj, kie la lernantoj povas esti kvalifikitaj en unu aŭ alia branĉo de tekniko k povas trovi laboron post sia eliro.

Normala (pedagogia) lernejo

Dum la mondmilito Japanio ĝuis tian ekonomian bonstaton, ke la salajro de tiuj, kiuj servis en kompanioj aŭ en bankoj aŭ en aliaj fakoj de sociaj, publikaj k registaraj institucioj estis tre bona, k registaraj oficistoj malkontente anoncis, ke varbitoj al pedagogiaj lernejoj estas tro malmultaj; ili neniam atingis la nombron, kiun la registaro decidis varbi; en tiu epoko la vivo de l' instruistoj estis konsider-

ata tiel mizera pro tio ke la salajro estis tre malalta kompare kun la enspezoj de aliaj profesianoj.

De la komenco de la ĝenerala ekonomia malfacilo, oni turnis sin al pedagogia lernejo, ĉar oni senpage ricevas edukadon k ricevas licencion, k ilia laborloko estas jam difinita antaŭ ol ili elfinis la lernejon; tial akcepto al pedagogia lernejo certigas panakiron estontan, k en la epoko, kiam en ĉiuj fakoj malpliiĝas la pago, la salajro de l' instruistoj estas sufiĉe bona kompare kun alifakaj profesianoj.

Kiam la pedagogia lernejo en Aomori-distrikto ordinare varbis 20 novajn lernantojn, en 1930 ja pli ol 700 varbiĝis. Nun en Tokio jam en la unua tago de varbo la sube menciataj nombroj aperis. Ili plinombriĝos ĝis la limtago de l' varbado, k en aprilo nur eta elcento el la varbitoj povos eniri la lernejojn post furioza konkurekzameno.

Pri la statoj de altaj lernejoj ni ne tuŝis; la supreskribita estas malgranda skizo pri la instruista vivo en elementaj k mezaj lernejoj en Japanio.

En Tokio estas 2 pedagogiaj lernejoj por knaboj k 1 por knabinoj. La elfinintoj ricevas licencion de instruistoj en elementaj lernejoj. La lernejoj nun varbas; ilia varbo komenciĝis je la 9-a de februaro. Je la 9-a horo en tiu tago la pordego malfermiĝis por akcepti petskribojn de varbotoj. Jen estas la nombroj, kiuj montras, kiom da petskriboj akceptiĝis dum nur 3 horoj, de la 9-a horo ĝis la tagmezo. La limtago por petskriboj estas la 20-a de marto; oni do povas imagi, kiom multe da petskriboj amasiĝos en tiu tempodaŭro.

	akceptota nombro	varbitoj dum 3 horoj
La Unua Pedagogia Lernejo	80	560
La Dua Pedagogia Lernejo	80	543
Virinpedagogia Lernejo	40	543

Sennaciulino en Japanio.

La mondtrusto Unilever

Kio estas Unilever? Estas unuiĝo de margarin-trusto k sapo-trusto. Kiel al margarino, tiel al sapo oni utiligas la samajn krudmaterialojn. Ambaŭ trustoj, kiuj de nun havas la nomon Unilever, metis sub sian kontrolon grandegajn ole-interesojn.

Por montri la evoluon de l' du trustoj, ni unue priskribas la

Margarintruston.

La gvidantaj konzernoj en la margarintrusto estas la du holandaj grandsocietoj Jürgens k van den Bergh, k Georgo Ŝiĥt en Ĉeĥoslovakio, kiu nun disponas pri 75% de la margarina produktado en Eŭropo.

La margarintrusto ne nur celas sole estri la pretan produkton; ĝi ankaŭ iom post iom sukcesis meti sub sian kontrolon la krudmaterialojn.

La sapotrusto

estas ĉefe ligita al la firmo Lever Bros. Ltd., Londono. Ankaŭ tiu ĉi konzerno havas mondampleksajn interesojn. En 1928 la societo disponis kapitalon de ĉ. 300 milionoj da dolaroj.

La kunfandiĝo de ambaŭ trustoj okazis la 1-an de januaro 1930. Pli frue ili ankaŭ kunlaboris pri akiro de la krudmaterialoj dividante vastajn merkatojn inter si. Pro tio la margaringrupo rezignis fabriki sapon k la sapogrupo rezignis fabriki margarinon.

Laŭ raporto ĉe la ĝenerala kunveno en Londono (1929) la sapotrusto konsistis el ĉ. 600 societoj k konzernoj kun kapitalo de 625 milionoj da dolaroj k havis netan gajnon de ĉ. 35 milionoj da dolaroj, 5 milionojn da dolaroj pli ol antaŭan jaron.

La margarintrusto havis en la sama jaro netan gajnon de ĉ. 20 milionoj da dolaroj, duoble pli multe ol antaŭajare.

Ambaŭ trustoj unuigitaj en Unilever disponas pri 80% de la kokosareoj k gigantaj areoj da olepalmoj. Krome ĝi havas grandajn interesojn en la balenkaptaj societoj, ĉar ĝi utiligas ĝis 90% el la balenoleo, kies prezon ĝi sola diktas.

Kia estas la sorto de la milionoj da proletoj, kiuj en la vasta mondo laboras sub trusto? Ni bezonas komunan lingvon. Ĉu ne? *(102)*

Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT k abonoj por "S-ulo".

Kontraŭ la regantaj perceptoj pri krimo k puno

de D-rino Klara Mejer-Viĥmann (Clara Meyer-Wichmann)

Kial oni punas?

La plej multaj homoj eĉ ne konsciiĝas pri tiu demando; por ili estas natura afero, ke ekzistas pundomoj, ĉelmalliberejoj, en kiujn oni enŝlosas tiujn, kiuj malobservis la punleĝojn de tiu ĉi socio, por la daŭro de semajnoj aŭ monatoj aŭ ankaŭ por la daŭro de jaroj. Ili iras preter tiuj malliberejoj, kies ekzisto ne tuŝas ilin.

Aliaj, kiuj fojon metis al si ĉi tiun demandon, trovas ĝin facile solvebla. La konscio pri justeco, ili diras, postulas repagon pro la farita maljustaĵo. Aŭ ili rigardas la intereson de la socio kiel la plej gravan k juĝas, ke ĝi devas ŝirmi sin mem kontraŭ atencoj kontraŭ sia ordo per tio, ke oni detimigas la homojn de la krimo, korektas se eble la krimulon, k, se tio laŭ ilia opinio ne eblas, igas lin ne danĝera.

Tiuj, kiuj tiel rezonas, antaŭkonjektas, ke tiu, kiu malobeas la estantajn punleĝojn, estas malbonulo, kvazaŭa atencanto de la morala mondordo, k ke tiu ĉi socio, kies plimulto lin kondamnas, estas vera homa kunvivado. Kaj plue ilia deira opinio estas kvazaŭ estus memkompreneble, ke suferigo k apartigo estas la ĝusta agmaniero kontraŭ "krimuloj".

Ĉi-ĉion ni opinias el la fundo de nia koro malĝusta k fatala: malfeliĉon portantaj eraraj kredoj, kiuj daŭrigas la ekziston de rilatoj malindaj inter homoj.

Jam ne estas vere, ke nia nuntempa juro estas LA JURO; ĝi ja protektas la posedantajn klasojn, ĝi sankcias la estantajn statojn de posedo, kvazaŭ tiuj indus esti konservataj je ĉiu prezo.

Memiluziigo troviĝas ankaŭ en la imago, kiun la nekondamnitoj formas al si pri la kondamnitoj. Certe estas facile pensi, ke la plimulto el la kondamnitoj estas malplivalora, k la plimulto el NEkondamnitoj plibonspeca; sed vere, tiel simple ne estas. Kaj ĉe tio ni tute ne maltrotaksas la signifon de la natura individueco, ni tute ne diras, ke sole dependas de la cirkonstancoj, kiajn farojn faros homo; sed ni vidas naturan individuecon k cirkonstancojn konstante efikantajn unu sur alian en reciproka interinfluado. Vi pripensu, ke tiu, kiu kreskadas kiel nezorgata infano k sub la daŭra nesufiĉo de ĉio, kio igas la vivon vivinda, fariĝas alia personeco k fine faros aliajn farojn, ol tiu, kiu kun la sama natura individueco vivas en tute aliaj cirkonstancoj. Vi pripensu, ke en ĉiuj landoj la ega plimulto el ĉiuj kondamnitoj, eĉ proporcie al sia parto en la loĝantaro, apartenas al la neposedantaj klasoj! Se krimo sole rezultus el manko je socia sentado, el manko je memregado, el "la malboneco de la koro", ĉu ankaŭ tiukaze la afero estus tia? Ĉu nefirmpsikuloj, ne sin regantaj, NE troviĝas inter tiuj, kiuj neniam aperas antaŭ punjuĝisto? Kaj ĉu ne en ĉiuj epokoj montriĝis, ke la kriminaleco pliiĝas k malpliiĝas kune kun la socia mizero; ke ĝi dum krizaj tempoj, kiel en la lastpasintaj militjaroj, nerezisteble pligrandiĝas, nehaltigebla per ajna punaro? Ĉu ni ne scias jam delonge ke ekzistas reguleco, eĉ nepreco de naturleĝo, en la nombro de ĉiujare okazantaj krimoj k sinmortigoj; ke do tiurilate oni ne povas paroli pri arbitraj faroj de unuopaj individuoj?

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

La situacio en Aŭstrio

Kiel ĉie en la kapitalista mondo, ankaŭ en Aŭstrio senlaboreco furiozas en ĝis nun neniam vidita mezuro. La senlaborula armeo kreskas ĉiutage, la zenito de l' krizo ŝajne ankoraŭ ne estas atingita. Nuntempe oni nombras ĉ. 330 mil registritajn senlaborulojn, tio estas 65 mil pli ol je sama tempo pasintjare. Ĉiu 4-a laboristo estas senokupa. La burĝaro ne hezitas eluzi la mizeron de l' laborul-amasoj por ataki iliajn rajtojn k la socian leĝaron. La "Alpine-Montan-Kompanio" unue reduktis kun helpo de l' "Sendependa Sindikato" (hejmdefendul-faŝista) la salajrojn de l' stiriaj metallaboristoj je 10 ĝis 15 po-centoj, plilongigis la labortempon k forrabis de ili plian vicon da rajtoj. La laboristoj de l' Alpine-Montan-Kompanio forlasis antaŭ du jaroj, parte sub la teroro de la direktoroj, inĝenieroj k oficistoj, parte ankaŭ libervole, en granda nombro la "Liberan Sindikaton" k aliĝis al la faŝista hejmdefenda ligo k ties sindikato. Tiam la direktoroj, ĉiuj komandantoj de l' "Hejmdefendo", multon promesis al la "K-doj" laboristoj. Malaltigo de ilia sufiĉe malalta vivnivelo nun estas la sekvo de rezigno je la klasbatalo. Ankaŭ la fervojistaro troviĝas en grava batalo por siaj sociaj akiroj. La ĝeneraldirektoro de aŭstriaj fervojoj komunikis al la sindikatoj longan dezirliston de salajro- k libertempreduktoj por la fervojistoj. Preskaŭ samtempe la registaro anoncas "reformon" de la senlaboreca asekurleĝo. Ja ne estas malfacile diveni, ke la vorto "reformo" signifas malaltigon de la senlaborula monsubteno. Tiel la amasoj ĉiam pli k pli mizeriĝas. (17 245)

Esperantistoj en malliberejo (Rumanio)

Kun la pli akra ekonomia krizo pliakriĝas en Rumanio la teroro kontraŭ la revoluciema laboristaro. La profunda krizo precipe estas videbla en terkulturo, sed ankaŭ same intense ĝi furiozas en la industrio. Pri la kvanto da senlaboruloj oni ne multon povas scii, pro manko de statistikoj. Oni taksas ĝin trioble pli ampleksa rilate kun pasinta jaro. La rumanaj laboristoj ankoraŭ havas en freŝa memoro la fiagojn de l' reganta klaso en Lupeni, Bohus k lastatempe en Bukaresto: rezultis pluraj mortigitoj k amaso da vunditoj. Tamen tiu rezulto ne sufiĉas al ili; oni arestas k enkarcerigas plue la plej aktivajn K-dojn. Ankaŭ dum la tekslaborista striko, kiu komenciĝis je 5. nov. 1930, la sekreta policistaro arestis pli ol 250 gelaboristojn, precipe virinojn; inter ili estis multaj junlaboristoj-esperantistoj. En sept. sekretpolicanoj arestis K-don A. Karpati pro esp. korespondado; la I-a k II-a klastribunalo jam kondamnis lin je unujara malliberigo, 10 mil leoj da monpuno k senigo je politikaj rajtoj dum 5 jaroj. Fine restis arestitaj 10 junlaboristoj, kies liberiĝo povus esti atingata, se sufiĉe da mono por punliberigo estus kolektita (50 leoj por ĉiu tago en karcero). *(15 080)*

Malsatuloj en Aŭstralio

Registara statistiko konstatas, ke en Aŭstralio estas produktata jare pli ol unu miliono da tunoj da tritiko. Malgraŭ tio malsatuloj ne mankas ĉi tie. La "Socialisto Revolucia" reproduktas foton de malsat-suferanta knabino 11-jara, kiun oni devis transporti en la Sidnejan hospitalon. Pro malsato mortis en Balmen (Balmain), registara hospitalo, 9 infanoj. Dume la ratoj supersatiĝas je la grenprovizoj. Notinde estas, ke el la 6 federaciaj ŝtatoj de Aŭstralio 3 estas regataj de la Labor-partio; same la tutfederacia regado estas en manoj de tiu partio. *(16 884)*

Faŝistaj atencoj en Germanio

Inter la murdoj faritaj lastatempe de nacisocialistoj (faŝistoj) kontraŭ komunistoj k socialdemokratoj en Germanio, elvokis plej fortan eĥon en la gazetaro (eĉ la burĝe liberala) la insidmortigo malvarme antaŭmeditita k -preparita de tri nacisocialistaj krimuloj al la komunista urbkonsilanto E. Hening (Henning) en Hamburgo. Post publikiĝo de l' fakto la amasoj ariĝis spontanee en multaj germaniaj urboj por esprimi per manifestacioj sian indignon. *P. S.*

Ankoraŭfoje: ni ne neas, ke dependas de ies naturaj ecoj, ĉu li fariĝos viktimo de tiuj cirkonstancoj aŭ ne; ni ne neas la kapablon de la memdecidanta personeco, ne submetiĝi antaŭ ajnaj cirkonstancoj; sed al tiuj, kiuj mem travivis nenion de tiu mizero, ni rifuzas doni la rajton, senindulge k sename fari la plej altajn moralajn postulojn al la mizeruloj. — Kaj pli forte dirite: ni opinias, ke tiuj plej altaj postuloj, se farataj, tute ne ĉiam kondukos al respektado de la ekzistantaj leĝoj, kiuj faris punindaj la militservo-rifuzon k kelkajn formojn de striko: ni kontraŭe kredas, ke tiuj postuloj ofte dezirigos ribelon kontraŭ tiuj leĝoj mem!

Socio, preskaŭ tute bazita sur la batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, edukanta la homojn en la pensmaniero, ke oni havas la rajton pliriĉigi sin k profiti ekspluatante la proksimulon, k en kiu oni malhavigas al la plimulto la kondiĉojn por ĝia normala evoluado, tia socio per si mem kreas la *personajn* k *sociajn* kaŭzojn, el kiuj konstante naskiĝadas krimo. La personajn, ĉar ĝi (pro nesufiĉa nutrado, alkoholismo, loĝmizero) kreas degeneron; la sociajn, ĉar ĝi ĉiufoje devigas la senheredigitojn, en ofte nekonsciata ribelo, preni neleĝe tion, kio estas detenata de ili leĝe. Dum fine ĝi ankaŭ kreas la principajn kontraŭbatalantojn de tiu ĉi tuta "ordo", tiujn, kiuj kontraŭstaras la tutan fundamenton de la nuna politikekonomia sistemo, la militservo-rifuzantojn, la politikajn krimulojn, kiuj ja ĉiuj de la estroj de l' nuntempa socio estas rigardataj k punataj kiel krimuloj.

Punrajton do certe ne havas ĉi tiu socio, en kiu por la normaluloj estas manko je kondiĉoj por evoluado k por la nenormaluloj manko je amriĉa zorgo. Tio, kion la plimulto el ĝiaj membroj aplikas kontraŭ krimuloj, estas *egoista memdefendo,* kvankam kaŝita en ilia konscio sub ĉiaj devizoj, kiel konservado de la ordo k de la justeco. Pro ĉiaj malpli gravaj interesoj oni opinias ne povi toleri, ke ŝtelo aŭ rompŝtelo okazu; nur pro tio oni punas tiajn farojn. Kaj ĉi tiun sinokupadon kun la vivo de proksimuloj, ĉi tiun enŝlosadon por monatoj, por ŝirmi la posedon de kelkaj materiaj havaĵoj, ĉi-ĉion oni trovas tute simpla.

LA PLIMULTO EL NIAJ PUNPERSEKUTOJ KONCERNAS TIAJN KAZOJN; KULPULOJ JE TIAJ FAKTOJ KONSISTIGAS LA PLIMULTON EL LA LOĜANTOJ DE NIAJ MALLIBEREJOJ!

Sed *ekzistas* aliaj faktoj; krimoj pro krudo, kruelo, profitemo, precipe de posedantoj kontraŭ neposedantoj, sekskrimoj, mortigoj, krimbatadoj gravaj k negravaj. Multaj certe opinias, ke kontraŭ tiaj faroj la puno do ĉiukaze estas justa; t. e. ĉiam kiam temas pri efektivaj krimoj — aŭ pli ĝuste pri efektivaj *krimuloj* aŭ kiuj ŝajnas al ni tiaj.

Ne, la bruteco de la puno ne sole konsistas en tio, ke socia ordo, kiu mem konstante kreadas la kondiĉojn por krimo, kiu mem (en formo de milito k ekonomia ekspluatado) sankciadas la krimon po-grandan, minacas k punas tiujn, kiuj atencas ĝiajn interesojn.

LA BRUTECO ANKAŬ KONSISTAS EN LA MANIERO DE REAGADO MEM. (Finota.)

El la nederlanda lingvo tradukita de Nikune.

NIA KLUBO

Skizo originale verkita de Kurmanajev (9742) laŭ materialoj de laboristo el la fabriko "Pariza Komuno" P. Dunajev.

Sur la Letnikova strato de Moskvo, proksime de Pavelecka fervoja stacidomo, troviĝas unuigita profesia Klubo de tanistoj, botistoj k ledistoj je nomo de Oktobra Revolucio. Inter la strato k la klubo oni sentas akran kontraston: la strato estas malluma, ne gastigema, la klubo male — hela, reviviĝema.

Ĉu venos vi en la klubon lunde, ĉu dimanĉe — ĝi estas plenplena je gelaboristoj, botistoj, ledistoj k tanistoj. Niaj laboristoj ŝatas sian klubon k ĝi tion tute meritas. Ĝi bonege starigis la amasan laboron k scipovas krei bonegajn kondiĉojn por la ripozo.

Ni ne parolos pri kinolekcioj, raportoj k. c., kiuj entute meritas la atenton. Ni notos ekzemple la organizadon de familiaj vesperoj, kiujn oni aranĝas ĉe ni ne pli malofte ol unufoje dum la monato. Jen okaze vi trafis tian vesperon. Senvestiĝis. Eniras la salonegon de la klubo. Antaŭ ĉio viaj okuloj haltiĝas sur la blankaj tablotukoj de la bufedo, sur la bongustaj montetoj da pomoj, bakaĵoj, diversaj buterpanoj, sukeraĵoj ktp. La prezoj estas modestaj. La alkoholaĵoj kompreneble forestas.

La laboristoj kune kun siaj edzinoj sidiĝas apud tiuj tabloj (vere ili venis en la klubon eĉ kun la infanoj, sed la infanojn vi en la salonego ne renkontas: ili ludas k trinkas teon en sia aparta ĉambro — infana ĉambro). Dum tetrinkado oni faras konversaciojn pri tiuj aŭ aliaj aktualaj temoj.

La administracio de l' klubo iafoje speciale difinas inter sia aktivularo apartajn K-dojn por iniciati tiajn interparoladojn. Post la teo oni rigardas la spektaklon, kiun partoprenas aktoroj invititaj el la Ŝtataj Akademiaj aŭ Profesiaj teatroj.

Dum la tempo, kiam la gepatroj rigardas la spektaklon, iliaj infanoj, sub la gvidado de spertaj edukistoj, ludas en infana ĉambro. Tiu ĉi ĉambro estas ĉiam malfermita. En la klubo krom la biblioteko por la plenaĝuloj oni havas porinfanan bibliotekon en speciale komforta ĉambro k kun speciala elektita libraro. La uzado de l' libroj estas senpaga ĉe ambaŭ bibliotekoj por ĉiuj membroj de l' prof. unuiĝo (eĉ nemembroj de la klubo).

Se vi iam vizitos la klubon, mi konsilus al vi rigardi la "produktadan ĉambron", por ke vi akiru ian imagon pri la laboro plenumata en la produktado.

Ĝi estas mirinda ĉambro. Vizitinte ĝin vi ekscios, kiel k el kio oni preparas la botojn. Nepre vizitu ankaŭ la ĉambron de ripozo . . . Mola meblaro, tapiŝoj, silentado, komforto — jen ĝia enhavo. Sur la tabloj vi trovas lastajn numerojn de diversaj ĵurnaloj k gazetoj.

Iru al la administrejo k prenu de dejoranta ano la radian duoblan kaptelefonon (senpage). Revenu en la ĉambron de ripozo k sidiĝu en seĝegon. Sur la muro vi trovas por la seĝego kontaktilon. Kunligu la kaptelefonon k aŭskultu la programon de l' radio-stacio, same kiel ĝin aŭskultas deko da aliaj viaj Gek-doj oportune kuŝantaj sur la kanapoj k seĝegoj de la ĉambro.


Klubo de lernantoj en vilaĝo (USSR)

Jam ne unu fojon mi aŭdis de vizitantoj de nia klubo (literaturistoj), ke la legejo de nia klubo estas pli bona ol legejo de "Domo de Gazetaro". Ĉu tio por nia legejo ne estas la plej bona atesto? La klubo havas ankaŭ rondeton de blovinstrumenta orkestro. Dum manifestacioj penu trovi okule la kolonon de ledistoj, botistoj k tanistoj k vi aŭskultante scios kiel ludas tiu ĉi orkestro. La klubo plie havas fotorondeton. En la salonego oni ekspozas la fotojn de ĝiaj anoj, kiujn oni faris en la produktejoj. La plej bonajn fotojn oni presas en la profesia gazeto "La Voĉo de Ledistoj". Krome ekzistas dramimproviza rondeto. Ĉu bone aŭ malbone ĝi laboras — juĝu mem dum ĝia ludado en la klubo. Plimulto da ĝiaj malnovaj rondetanoj jam laboras en teatroj de laboristaj junuloj en Moskvo.

La klubo havas ankaŭ sekvantajn rondetojn: ĥoran, harmonikistan k literaturan. La lasta estas intime kunligita kun la dramkolektivo.

Viziti la klubon k partopreni laborojn de ĉiuj ĝiaj rondetoj povas tute senpage ĉiu membro de la profunuiĝo (sindikato), eĉ ne estante klubano. Vizito al spektakloj estas pagata, tamen la prezoj estas tre modestaj: de 25—75 kopekoj. Por rigardi la kinobildojn oni devas pagi 15 ĝis 50 kopekojn. Ofte por gelaboristoj de tia aŭ alia organizo oni aranĝas senpagajn kinoprezentojn k por membroj de l' klubo eĉ senpagajn spektaklo-prezentojn.

La profunuiĝano deziranta membriĝi la klubon pagas 25 ĝis 100 kopekojn kiel kotizon monatan (laŭ grado de l' ricevata salajro). La klubmembro rilate al profesi-membro havas la prerogativon aktive partopreni la kunvenojn de klubmembroj k aktive decidi ĉiujn demandojn tuŝantajn la klubon, ankaŭ esti elektitaj por diversaj oficoj de la administracio.

La kluba buĝeto konsistiĝas plej grandparte el la rimedoj donitaj al ĝi de l' prof. unuiĝo k el diversaj enspezoj propraj (membrokotizoj, pago por spektakloj, kino, uzado de salonego dum liberaj legatoj por diversaj kunsidoj ktp.).

Botistoj, ledistoj k tanistoj tre amas sian klubon k ofte multnombre ĝin vizitadas. Tial ni opiniis inda, por konatiĝo de la tutmonda laboristaro kun nia klubo priskribi ĝiajn bonajn flankojn de laboro, ne tuŝante ĝiajn mankojn. Tio ne signifas, ke ĝi ilin ne havis k ne havas; sed pri la mankoj k malbonoj ni parolos al la legantoj eble alian fojon.

Kiel k kial mi fariĝis komunisto

La 21-an de decembro 1928 mi ekmalsaniĝis en Parizo. Mi reiris al mia nasklando, k mi eniris klinikon en la ĉirkaŭaĵoj de Tulono (Toulon), Francio. En tiu epoko mi ne okupiĝis pri sociaj aferoj; miaj legaĵoj preferataj estis vantaj k idiotaj. En la oktobra monato mi amikiĝis kun malsanulo, kiu estis anarkisto. Jen li ekinstigis min atenti pri politikaj, sociaj, literaturaj problemoj. Li aĉetigis min multajn librojn, verkitajn de Rasin (Racine), Moljer (Molière) k ankaŭ de grekaj k romanaj aŭtoroj. Li legigis min ankaŭ proletajn k speciale anarkistajn ĵurnalojn, nome: *Mondo, Libera Ideo* ktp. Poste okazis longaj paroladoj (estis nur li, kiu parolis; mi aŭskultis), per kiuj li komprenigis al mi, ke se mi estus malsana, tio estas pro la senhonta ekspluatado de fikomercisto, kiu laborigis min por akiri pli da profitoj, ne pagante plian seruriston; ĉar mi faris la laboron, kiun estus farintaj du seruristoj. Mi ekkomprenis, k mi ekmalamis la ulojn, kiujn oni nomas "kapitalistoj". Tamen mi ne ankoraŭ bone decidiĝis, ĉu mi devus fariĝi komunisto aŭ socialisto.

Tiam eniris la klinikon nova mal-

TRA ESPERANTIO

PRI LA AKTIVA MEMBRECO

Unu el la asertoj de la opozicio estas, ke la Lajpciga decido pri la aktiva membreco estas "direkcia artifikaĵo". La tono de la artikolo en "Internaciisto", en kiu tiu k aliaj asertoj estas prezentitaj al la publiko, povas impresi nur tiujn Gek-dojn, kiuj ne kutimas logike, objektive k racie pensadi k rezonadi, k kiuj pro tio tuj estas pretaj — ĉu ili konas la temon aŭ ne — aplaŭdi tiun eldiron.

Estas necese esplori, ĉu tiu aserto havas bazon k farante tiun esploron mi fidas je la sana prudento de niaj anoj, kiuj ja subskribis la unuan statut-paragrafon de nia organizo, kiu diras i. a.: ke ĝi [illegible]ntas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj k helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni k prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn k sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias la plej rekta ktp.

Aplaŭdi asertojn, senbaze, gravvorte k agite prezentatajn, certe ne apartenas al la teniĝo de bona SAT-ano.

Ni do esploru la historion de tiu decido:

En "S-ulo" n-o 249 (11. julio 1929) aperis jena propono al la Lajpciga Kongreso de la Valencia SAT-anaro:

(Prop. 17) "Ĉar estas vera malhelpo por la ĝenerala SAT-agado, ke nur de jaro al jaro, okaze de la ricevo de l' Jarlibro, la anoj ne abonantaj la oficialajn organojn, sciiĝas pri la ekzisto de la Asocio, tial la Valencia SAT-anaro proponas: La SAT-direkcio eldonu *trimonate* kroman oficialan eldonaĵeton, kies titolo povus esti: 'SAT-Bulteno'. Ricevu ĝin ĉiu aktiva SAT-ano pere de la loka peranto. La gazeteto enhavu nur skize ĉion diskonindan por la tuta membraro. Amplekso k formato estu modesta, kiel 'La Lernanto'. Se la nuna ekonomia stato de SAT ne estas favora por fari tian plian elspezon, ni ankoraŭ proponas, ke ĉe la kvar aperfojoj pojare de tiu Bulteno 'S-ulo' estu 8-paĝa, ĉar ni opinias, ke oni devas oferi iom el la privataj rajtoj por la komuna k ĝenerala pliboniĝo."

En "S-ulo" n-o 251 (25. julio 1929) aperis jena propono al la sama Kongreso:

(Prop. 27) "Konsiderante, ke SAT havas ĝis 7000 membrojn, sed nur 3 ĝis 4000 abonantojn al la *oficiala organo* 'S-ulo', k plie konsiderante, ke la vorto 'aktiva' rilatas al 'agi', t. e. ke la membro finance k spirite helpas al nia movado, mi proponas: ĉiu aktiva membro *devas aboni* al 'S-ulo'. Membroj, kiuj aliĝas aŭ rekotizas sen abono al "S-ulo', estas konsiderataj nur kiel pasivaj membroj. (13 381)."

Jam tuj la motivoj de tiuj ĉi proponoj ricevis mian simpation. Estas ja juste k ĝuste, ke nur tiu rajtu partopreni la diskutojn, decidojn k voĉdonojn, kiuj estas plene informita pri ĉio, kio okazas en nia organizo. Estas ja neeble doni tiun rajton al anoj, kiuj nenion scias pri ĝia interna vivo. Kaj kiel oni estas informata pri la organizaj aferoj? Per la organiza oficiala organo! Tio estas tiel klara, ke ĝi ne bezonas plian klarigon.

Dum la Lajpciga Kongreso propono 17 estas laŭ konsilo de la Proponkomisiono unuanime malakceptita. Anstataŭe la Prop. Kom. rekomendis akcepton de la propono 27, kiun la komisiono unuanime aprobis kun jena aldono: "K-doj, kiuj estas en mizera stato, laŭ la propono de la Perantoj aŭ grupoj estas esceptataj." La Kongreso akceptis tiun proponon kun la aldono unuanime. (Protokolaro de la 9-a Kongreso, "S-ulo" 256, 29. aŭg. 1929).

Ni notu bone, ke la Prop. Kom. *rekomendis* k *unuanime aprobis* proponon 27 kun la proponita aldono; ke la Kongreso *unuanime* akceptis la proponon kun ĝia aldono k ke ankaŭ la referendumo ĝin akceptis.

Kiuj K-doj konsistigis tiun Proponkomisionon? Estas la K-doj: H. Muravkin (prez.), V. Kaulich (sekr.), W. Sterzenbach, A. Guhr, J. Burger, P. Köckeritz, K. Deubler, E. Rek, E. Lanti k W. Vildebrand. Inter tiuj nomoj estas kelkaj, kiuj igas nin miri pri la aserto de la opozicio, ke "la Lajpciga decido estas direkcia artifikaĵo". Oni frotas siajn okulojn, legante, ke inter la anoj de la Prop.-komisiono estas kelkaj, kiuj nun agitas kontraŭ decido, kiun ili mem rekomendis k proponis!

Sed ĉu la tuta voĉdon-afero valoras tiom da tumulto k suspektigo? La statistiko parolu: Dum la lastaj tri jaroj oni voĉdonis jene:

1928 voĉdonis 1133 el 6023 anoj, t. e. 18,8%
1929 voĉdonis 1831 el 5170 anoj, t. e. 35,4%
1930 voĉdonis 1397 el 6412 anoj, t. e. 21,8%

El tio ni vidas klare, ke antaŭ la agitado de la opoziciuloj la fakte aktivaj anoj ne estis tiom multaj, kiom estis da abonantoj! Ĉu do la en Lajpcig akceptita statut-ŝanĝo *fakte* ŝanĝis ion? Ne! Tamen la opozicio asertas, ke per tiu statut-ŝanĝo "oni volas mutigi k senrajtigi 2000 Sovetiajn SAT-anojn k milojn da senlaboruloj-SAT-anoj en kapitalistaj landoj", kiuj neniam malfermis sian buŝon k uzis siajn rajtojn, kiel montras ĉi-supra statistiko!

Kia ĥaoso devas esti en la kapoj de tiuj, kiuj senkritike "glutas" la opozician artifikaĵon! *F. (13 745).*

---

sanulo, kun kiu ankaŭ mi amikiĝis. Li estis komunisto k li dokumentumis min pri sia partio. Mi havis ankoraŭ alian amikon k tiu ĉi sciis esperanton. Li parolis al mi pri sia kara lingvo k decidis ĝin lernigi al mi. Tuj kiam mi bone finlernis esperanton, mi aliĝis al SAT k sur la aliĝilo mi notis: komunisto. Samtempe kun mia membriĝo ĉe SAT mi fariĝis komunisto; fariĝis tiam mi ankaŭ sennaciisto. Tio ne signifas, ke mi deziras, ke la komunistoj kaptu SAT. Ne. Kontraŭe, mi gratulas al SAT pro ĝia neŭtraleco k petegas ĝin sekvi tiun vojon; ĉar aliel, se SAT falus en la manojn de aparta politika partio, tio signifus ĝian malaperon. Vivu la unuiĝo, k estu forpelataj la malamikoj!

Ruŝu (Rouchou), 16 828.

EL LA REDAKTEJO

En ĉiu n-o de "S-ulo" vi legas mallongajn aktualajn raportetojn kolektitajn sub la titolo "La Klasbatalo tra la Mondo". Tiaj mallongaj sciigoj ja taŭgas ne nur por informi la legantojn, kiuj ofte preferas tian legaĵon ol pli longaj artikoloj; ili ankaŭ tre konvenas por esti tradukataj k represataj en la nacilingva gazetaro.

Bedaŭrinde la kunlaborado al ĉi tiu rubriko estas nesufiĉa. Dum ĝenerale abundas pli longaj manuskriptoj, mankas tiaj aktualaĵoj koncize verkitaj. Kompreneble oni ne povas trakti simile koncize ĉiujn temojn, k ni ne riproĉas tiujn K-dojn, kiuj verkas pli longajn artikolojn — ĉiuokaze klopodantaj esti koncizaj — se la verkaĵoj estas originalaj k pensigaj. Sed multaj, eble ne konante la manieron verki etajn informojn, taŭgajn por "La Klasbatalo…", rezignas entute sendi skribaĵon al ni. Do tial kelkaj konsiloj ĉi tie:

1. Pri lokaj okazintaĵoj raportu nur,

Du facile prezenteblajn teatraĵojn,
parolĥorojn k versojn speciale taŭgajn
por deklamo enhavas la
14-a volumeto de "Biblioteko de Sennaciulo" sub la titolo

NIA TEATRO

64 pĝ. Form. 11×14. Prezo 0,60 mk. g.
Bibliotekistoj de grupoj k rondoj, mendu provizon por via bezono!
Administrejo de SAT, Leipzig O 27.

se ili havas pli vastan efikon k signifon, sekve estas ĝenerale konigindaj. 2. Pri okazoj, kiujn jam traktis la tutmonda lab. gazetaro, raportu nur, se vi mem povas aldoni ion kiel personan travivaĵon aŭ observon; sekve ne nur priskribu la eksteran aspekton de okazintaĵoj sen via persona rilato al ili. 3. Ne limigu tro la raportetojn al politikaj bataloj, strikoj ktp., sed konsideru ankaŭ la kulturan batalon, laboristan spiritostaton, organiziĝemon k. s.

El ĉiuj regionoj de l' terglobo, kie ekzistas SAT-anoj, ni dezirus ricevi raportetojn, el Eŭropo same kiel el aliaj kontinentoj. Tiel niaj informoj estos vivantaj, sendependaj k sekve tiom pli valoraj, k ni povos prave diri: LA SAT-aparato servas.

PROFITU LA OKAZON!

Laborinte dum pli ol jardeko en ekspluatejoj sen libertempo, mi nun pretigis min por transmara vojaĝo. Mi forveturos el Novjorko la 25-an de aprilo al Glasgovo, Edinburgo, Lidz (Leeds) k Londono (la ĉefaj lokoj, kiujn mi trapasos dum mia enbritia vojaĝo. Poste laŭvice mi haltos en Antverpeno, Bruselo, Parizo, Stutgarto, Munĥeno, Linz k Vieno. Pri la cetera vojo, kiu devas konduki min al Orienta Saksio, mi ne decidis jam (ĉu mi pasos tra Plzen-Dresdeno aŭ tra Silezio). Mia vojaĝo estu vera pro-k por-SAT-a vojaĝo. Mi do intencas paroli en la nomitaj urboj pri SAT-aferoj en speciale aranĝotaj kunvenoj, kiujn organizu la lokaj K-doj. Mi restos en unu loko du tagojn; ĉiu tria estos vojaĝtago. Se iuj SAT-anoj tiulokaj dum mia restado povos montri al mi laboristajn kvartalojn, fabrikojn, senlaborul-oficejojn ktp., mi tre kontentus. Mi preferus loĝi k manĝi ĉe K-doj, komprenеble kontraŭ kompenso; se ne eblas, mi loĝos en hoteloj. Revene mi partoprenos la SAT-Kongreson konigante tie miajn spertojn. SAT-rondoj, LEA-grupoj k izoluloj, kiuj deziras inviti min, turnu sin plej baldaŭ al K-do T. Veder, 24—29, Merchant St., Astoria, N. Y. (Usono); post la 10-a aprilo oni skribu al K-do Horace Walker, 25 Grimthorpe Terrace, Ash Rd., Headingley, Leeds (Anglio); plej malfruaj anoncu sin al red. de "S-ulo" en Parizo.

Veder (1307).

Korekto. Bedaŭrinde malklara fariĝis la frazo sur p. 195 (en n-o 337), 1-a linio de l' 3-a kolono, pro tio ke la kompostistoj transsaltis unu tutan linion. Necesas aldoni: ... (atakon kontraŭ) *la Pariza artilerio ĉe Monmartr (Montmartre), prenis pozicion* (kontraŭ la Versajanoj) ... Bv. korekti en via ekzemplero!

Al la pilorio!

Specialan koncepton pri transpago de SAT-mono al li konfidita havas eks-SAT-ano Gelenberg (Varsovio), kiu akceptis abonmonon por "S-ulo" de 20 samurbaj K-doj kun la promeso havigi al ili nian gazeton (kiu tiutempe malfacile eniris Polion). Tio daŭris sufiĉe longan tempon, ĝis per rekta korespondado de iu el la trompitoj kun la Administracio malkovriĝis, ke Gelenberg tute ne pagis la sumojn al Lajpcig. Male, tie por libroj k aliaj mendoj la ŝuldo sur lia konto kreskis ĝis 43.55 mk. g. La Admin. admonis lin eble dekfoje, k li same tiel ofte promesis pagi. Poste silento, ĝis ... ĉu ni devas esti mirigitaj pri tio? — en n-o 6 de "I-sto" lia nomo kun fideldeklaro al la opozicio aperas inter aliaj — k eĉ aldonis tiu fripono sian iaman SAT-matrikulon, kvankam li *de kelkaj jaroj ne plu pagis sian kotizon!*

Al la Esperantista Junularo Britia!

La kreskado nombre k entuziasme de l' britia lab. junulara movado, k ĝia pliaktiviĝo en laboro kontraŭmilita k kontraŭkapitalisma pli k pli bezonigis esp. propagandon. Tial la Plenum-Komitato de l' Brita LEA jam starigis Junularan Sekcion por a) propagandi esp-on inter lab. junularo k infanaro, b) starigi lab. esp. junul-grupojn por esp-istigo k alkonduko en ĝeneralan lab. esp. movadon. Junaj SAT- k LEA-anoj britiaj! ni tuj deziras aktivajn kunlaborantojn por labori ĉiuloke k ĉiudistrikte inter junaj komunistoj, socialistoj, Lab-liganoj, junkooperativanoj k infanoj. Interrilatu nepre kun la tutlanda organizanto: sekretario de l' Junulara Sekcio de BLEA, K-do W. Latimer, Edenside Cottage, Canal Bank, *Carlisle* (Cumb.), Britio.

Ĝustigo

En la komuniko pri la afero Oholiav kontraŭ Ker, publikigita en n-o 332, pĝ. 159, la 2-a piednoto entenas eraron: La prezidanto de l' Novjorka SAT-rondo, kiu ordinare ne havas voĉdonrajton, havas la decidan voĉon en okazo de egalnombraj voĉoj, k en la dirita voĉdono eluzis sian rajton.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

133 Tagoj de Sovethungario. Historia skizo de hungarlanda proletara revolucio. Kompilita el elektitaj artikoloj de gvidantoj k aktivuloj de hung. prol. revolucio. Eld. EKRELO, Leipzig. 1930. Form. 14×20. 142 pĝ. Prezo: 2 mk. g.

Kiel videble jam el la subtitola noto, temas pri kompillaboro; ĝi estas farita de kolektivo el kunlaborantoj k konsistas el pli malpli longaj skizoj pri la nelongdaŭra, tiom tragedie finiĝinta epoko de l' sovetregado en Hungario dum la jaro 1919. La libro estas ankaŭ ornamita per aro da ilustroj k en fino oni trovas klarigojn pri div. politik-teknikaj vortoj k neologismoj uzitaj en la verko. *N. B.*

Ruĝa Talko, *E. G. Pestun.* Fondiĝo de unua soveto en la jaro 1905. El rusa lingvo trad. *S. Stefan.* Eld. EKRELO, 1930. Form. 11×15. 21 pĝ. Prezo: 0,20 mk. g.

Estas historia priskribo de la bataloj de tekslaboristoj en la Ivanovo-Voznesenska regiono dum la cara regado. Kiel oni trovas ofte ĉe ruslingvanoj, la tradukinto tro malofte aplikis la difinitan artikolon "la".

Per Voĉo Plena. *V. Majakovski.* Revoluciaj poemoj. Eld. EKRELO, Leipzig 1930. 72 pĝ. Form. 12×16 cm. Prezo: 0,70 mk. g.

La subita morto (memmortigo) de Majakovski en lasta jaro altiris la atenton tutmondan al tiu proleta poeto sovetia. Ankaŭ en "S-ulo" tiam aperis 2 artikoloj pri li k lia verko (en n-oj 292 k 294). En antaŭparolo al la broŝuro ni legas, ke "prilabori ĉi tiun libreton instigis ne kutima esteta deziro de poeziamantoj, sed tute celkonforma tasko: prezenti per elektitaj modeloj la aktualan evoluon de la Sovetia proleta literaturo". La versoj estas liber-ritmaj; kelkaj aspektas tre strange, sed ne mankas en ili forto. Prestekniko malbona (preseraroj, elfalintaj literoj ktp.). Aro da neklarigitaj nov-vortoj (tribunuso, tumuluso, glaŭka, blaga, flako, latrino). *N. B.*

Nia gvidanto. Skizoj pri Lenin. Eld. EKRELO, Leipzig 1931. 48 pĝ. Form. 10×14 cm. Prezo: 0,35 mk. g.

Du artikoloj de Stalin (el kiu la pli longa jam aperis en la kadro de l' Komunista Biblioteko de CK SEU) k unu de Jaroslavski pri personeco de Lenin, lia koncepto pri armita ribelo k lia rolo en la komunista partio. Ni notis la neologismon "floto" anstataŭ "ŝiparo", kiu lasta vorto al ni ŝajnas tute sufiĉa.

Batalante por la metalo. *N. Mihajlov.* Elrusigis P. Gavrilov. 27 pĝ. Form. 10×14 cm. Eld. EKRELO, Leipzig 1931. Prezo: 0,20 mk. g.

Agitcela broŝuro por la efektivigo de l' Sovetia Kvinjarplano dum kvar jaroj, per priskribo de ekzemplo pri laborraciigo, laborinstigo k socialisma konkurado en metalfabriko de USSR. Ni trovis kelkajn neologismojn: soldisto (?) (p. 7, 25), detrimento (=malutilo) (p. 22); vera domaĝo estas la daŭra uzo de l' vorto "uzino" (anst. *fabriko*), kiu enŝteliĝis en rusaj vortaroj. "Sufokigi" (p. 18) estas gramatike malkorekta (devas esti: *sufoki*). *N. B.*

E. Drezen, Analiza Historio de Esperanto-Movado. Eld. EKRELO, Leipzig, 1931. 95 pĝ. Form. 14×22. Prezo: 1,70 mk. g.

De historiisto oni devas postuli unuavice objektivecon. Unuavide, laŭ

la prezentmaniero de l' libro, oni emus kredi, ke estis la celo de l' aŭtoro solvi sian taskon kun bona konscienco. Sed ho ve! tuj falas tiu ŝajno, kiam ni legas la lastan (X-an) ĉapitron pri la laborista esperantismo, kiu preparas al la leganto informita pli ol unu surprizon. La plej granda estas sendube la kruda agnosko pri la skismo en la lab. esp. movado (en aparta subĉapitro nomita "Splitiĝo de lab. esp. movado) kiel *fakto* . . . jam en tiu epoko! ĉar la antaŭparolo, kiu verŝajne estas verkita laste, portas la daton: **12. 5. 1930!** Tio ja estas nova fakto, kiu plifortigas la konjekton, ke dum tiu tempo jam, kiam en oficialaj deklaroj la skismigantoj ĉiam asertis, ke ili volas la unuecon la disigo de nia movado estis plendecidita, la malnobla plano kontraŭ SAT estis finpreparita de CK SEU.

Sed kie evidentiĝas la pasia neobjektivemo de l' aŭtoro, estas, kiam li diras pri K-do Lanti, ke ĉi tiu eksiĝis el la kompartio pro privataj konsideroj (pro timo perdi sian ŝtatoficon de instruisto!) (vd. pĝ. 83), kiam ĝuste en tiu jaro (1928) ekzistis nenia danĝero por li tiurilate. Ekzistis ja danĝero en 1923, kiam la reakcia instruministro Berar (Bérard) kontraŭbatalis la propagandon de esp-o k celis per tio speciale la kreskantan lab. esp. movadon.

Ne malpli karakteriza pri la "objektiveco" de l' aŭtoro estas lia forsilento pri siaj propraj mallertaĵoj k fiaskoj, rilate la faman ESKI, kio signifas: *Esp. Sekcio ĉe Komintern,* poste nomita *Esperantista Komunista Internacio,* ĉar ĝi stariĝis kiel Komintern-Sekcio sen demando pri konsento al Komintern mem! Tiu "Internacio" kun kelkdekoj da anoj nur en Rusio cetere vegetaĉis, ĝis la CK de l' Rusa Kompartio fermis ĝin. La malnovaj legantoj de "S. R." trovas en la n-o 28 (julio 1922) sufiĉe trafan ateston pri tio.

Tiom pli estas laŭdata de Drezen la agado de CK SEU. Se jam en antaŭaj ĉapitroj elmontriĝas ia nekontestebla patriotismo de l' aŭtoro (pĝ. 7, 35), en la ĉapitro pri SEU (pĝ. 85/88) la fiersento atingas la plejon. Estas trudata la impreso, ke la "rusaj" esperantistoj estis k estas la plej idealistaj pioniroj. Kaj kompreneble estas SEU, kiu "per sia centrigita organizo, per siaj konceptoj socie k lingvo-science senriproĉaj, per sia dialektika argumentado (*tiel!*), per la lernolibroj ellaboritaj laŭ statistika scienca metodo . . . ne nur ricevis certan atenton ĉe la sovetia publiko. Ankoraŭ plie — ĝi trudis sian idearon, siajn konceptojn k siajn labormetodojn al la organizitaj lab. esp-istoj eksterlandaj" (pĝ. 87). Tiel finsonas proksimume tiu ĉi cetere ne bonstila k ne tre originala verko.

N. B.

De Vem Världsdelarna. Esperanto-sveda agit-teatraĵo en unu akto de *Elma k Einar Adamson.* Eld. Svenska Esperantobyran, Göteborg. Prezo: 35 öre. 16 p. Form. 13×19.

Estas propagandaĵo parte esperant-, parte sved-lingve parolata, kiu taŭgas por interesi por esp-o ĉe varb-aranĝoj. Ĝi estis jam ludita en antaŭaj jaroj kelkfoje kun sukceso en pluraj svedaj urboj.

MEMORNOTO

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Tieng Dan, Hue (Hindo-Ĉinio), 11. 1. (pri SAT); *Phu-nu Tan-van,* Saigon, 27. 11. (nun malpermesata anamlingva organo); *Dong-Pnuong,* Hanoi, 24. 12.; *Signalen,* Stokh., 5. 3.; *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 7. 3.; *Le Populaire,* Paris, 9. 3.; *Labour Woman,* Londono, marto; *Neue Zeitg.,* München, 20. 2.; *S. A. S.* (sportgaz.), Dresden, 23. 2.; *Solidarität* (bicikl. organo), 1. 1.; *Le Règne de l' Homme,* Bièvres, 1. 3. (pri sennaciismo).

Peresper. materialon enhavis:

Neue Zeitung, München, 24. 2.

NIA POŜTO

Britianoj, atentu! Antaŭ kelkaj semajnoj ni ricevis el Britio grup-raporton por la "Kroniko"; ĉi tiu, sendita ĝustatempe al la presejo, tie estas bedaŭrinde perdita. Bonv. refoje sendi! *Red.*

KORESPONDADO

AŬSTRIO

—Aŭstra K-do interŝ. PI, fotojn. Adr.: Josef Horvat, Wielandgasse 41, III, S. 1, *Graz.*

—Aŭstra K-do interŝ. PI, fotojn. Adr. Karl Torsch, Schneider Schulg. 1, *Graz.*

FRANCIO

Kiu francia K-do aŭ grupo povas doni al mi informojn pri laborricevo en Francio? Sciigojn sendu al: K-do Rudolf Haidl, Construction de Locomotives, *Saint Joseph,* Nantes.

GERMANIO

K-do H. Schink, Schweizer Str., *Rotschau i. Vogtl.,* kĉl, L, PK, PI, PM. Ĉiusemajne mi povas sendi AIZ.

—Lab. Esp. Grupo koresp. kolektive k individue, L, PI, kĉl. Adr.: K-do Kurt Backmann, Bleichstr. 205 b, *Bielefeld.*

—Esp. rondeto serĉas viglan koresp-adon kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI, PM, fotojn, gaz. il. Adr.: K-do Alfred Ballin, Delitzscher Str. 2, *Schkeuditz.* — Resp. ni nepre garant.

K-do Willi Fischer, *Dittersdorf b. Chemnitz,* Nr. 61, c, kĉl, pri ĉ. tem. L, PK, PI. Certe resp.

HISPANIO

—K-do 15 430, devigita forlasi ĉi-landon petas helpon. Li ĝoje ie laborus k rekomp. laŭpove siajn helpantojn. Adr.: Johano del Peso, str. Belén 5, *Madrid.*

LITOVIO

Malliberulo koresp. kĉl. L, PK, kun ekstremaj pacistoj (kiuj neniel helpas militismon) pri pacaj k religiaj demandoj, precipe kun Gek-doj tolstojanoj. K-do Juzefo Petrulis, S. D. K., *Šiauliai.*

SVEDIO

—Kelkaj lernantoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: Ake Olsson, Box, 26-1, *Bromölla.*

—4 Gek-doj koresp. pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: E. Tenglin, Tallgatan 9, *Sundbyberg.*

Ĵus aperis:

Manifesto de la Sennaciistoj

32-paĝa kajero da dense presita teksto riĉenhava.

Neniu esperantisto rajtas malhavi tiun verketon, se li pretendas esti ĝuste informita pri la nova ideo-fluo, kiu plifirmiĝinte fosas sian sulkon en la laborista movado.

La tre malkara broŝuro estas mendebla ĉe jenaj adresoj:

Britio: (3 pencoj) K-do Horace Walker, 25, Grimthorpe Terrace, Ash Road, Headingley, *Leeds.*
Francio: (1,50 fk.) K-do L. G. Avid, 19 bis, rue J. B. Baudin, *Villejuif* (Seine).
Germanio: (0,25 mk. g.) K-do J. Burger, Bruchstr. 47 a, *Essen.*
Nederlando: (0,20 gd.) K-do F. Faulhaber, Marathonweg 15, II, *Amsterdam.*
Norvegio: (0,30 oeroj) K-do M. Muribo, H. H. Rodes Vei 1, Bekkelagshögda, *Oslo.*
Polio: (0,50 zl.) K-do St. Rostoniec, ul. Piekna 52, *Varsovio.*
Usono: (0,10 cd.) K-do T. Veder, 24—29 Merchant St., *Astoria,* L. I.

Ankaŭ mendebla ĉe la Administrejo de SAT.

Kart- k letervespero

en komenco de majo 1931. Ni nepre respondos k premios la plej bonan bildokarton k la plej interesan leteron. Proletara Esperanto-Grupo, *Hamburg-Altona,* Adr.: W. Behrmann, Berthastr. 6, III, r., Hamburg 22.

Al lab. societoj k Gek-doj de la tuta mondo!

Laborista societo esp. en Plzen-Peklo, aranĝos ĉi-jaran aŭtunon la 20-an solenan ĝeneralan kunvenon kun esp. ekspozicio. Tial ni petas dediĉi aŭ pruntedoni al ni, esp-ajn afiŝojn, gaz., PK, PI, PM, glumarkojn, fotojn ktp. Sendu ĉion al: Josef Pešek, prezidanto de la societo, Skvrnanská tr. 19, III, *Plzen* (Ĉeĥoslovakio). — *Ni ĉiam respondos!*

Atentu!

Gek-doj k Grupoj tutmondaj! — Lab. Esp. Grupo Weinböhla dez. serioze k longdaŭre koresp. pri temoj: politika, liberpensula, lab. vivo. Resp. garant. Skribu multnombre. Adr.: K-do Erwin Frost, Försterstr. 10, II, *Sörnewitz bei Meissen* (Germanio).

Esperantista Tendaro

13 km. de Nice. Vivo sub tendoj. Suno tutan jaron. Plena pensiono en tendo de 4 mk. g. Spec. prezo por karavanoj. Ekskursoj, nekare: Alpoj, Monte Carlo, Italio ktp. Skribu al: K-do Yelland, ASPREMONT apud Nice (Francio).

ENHAVO

	paĝo
La mizeregaj kondiĉoj de l' virino en Hindio	209—10
Banko bankrotas en Usono	210
Kiel la nuna ekonomia malviglo efikas sur la instruistan vivon en Japanio	210—11
La mondtrusto Unilever	211
Kontraŭ la regantaj perceptoj pri krimo k puno	211—12
La klasbatalo tra la mondo	212
Nia klubo	213
Kiel k kial mi fariĝis komunisto	213—14
Tra Esperantio	214—16
Korespondado	216

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)